

ĈAPITRO IX

LA VIV-HISTORIO DE LA FALSA KELONIO¹

“VI ne povas imagi” diris la Dukino “kiel ĝojige estas por mi revidi *vin*, mia kara.” Dirante tion, ŝi ligis sin al Alicio per la brako en tre bonkamarada maniero, kaj ili ekmarŝis kune.

Tre plaĉis al Alicio trovi, ke la Dukino estas nun bonhumora, kaj ŝi interne pensis ke antaŭe, kiam ili renkontiĝis en la kuirejo, eble igis ŝin malagrabra nur la pipro.

“Kiam *mi* estos Dukino” pensis ŝi “da pipro mi havos en mia kuirejo ĝuste neniom. Supo povas esti tre bona sen pipro. Eble pipro estas ĉiam la kaŭzo kiu igas la homojn koleraj.” Kaj ŝi daŭrigis tre fiere, kvazaŭ konsciante ke nun ŝi eldonas novan principon, tre gravan por

¹ Krom multaj aliaj supoj, la anglaj havas du, kiujn oni nomas “kelonia” kaj “falskelonia.” La unua, kompreneble, estas farata el kelonia viando. La alia estas je gusto tre simila; kaj oni konkludas ke se kelonia supo estas farata el la vera kelonio, la falskelonia nur povas esti farata el la Falsa Kelonio.

HISTORIO DE LA FALSA KELONIO 89

la homoj:—“Nur vinagro acidigas ilin, nur kamomilo maldolĉigas, kaj—(lasta kaj plej grava principo)—nur sukeraĵoj dolĉigas la infanojn. Se nur la plenaĝuloj *tion* scius, ili estus ja malpli ŝparemaj—”

Ŝi jam tute forgesis la Dukinon, kaj eksaltis surprize, aŭdante ŝian voĉon diranta:—

“Vi ion pripensas, mia kara, kaj pro tio forgesas paroli. Mi ne povas en la nuna momento citi la moralon de tio, sed kredeble mi rememoros ĝin poste.”

“Eble ĝi ne havas moralon” Alicio kuraĝis diri.

“*Tut! Tut!* Vi bubino” diris la Dukino “ĉio ja havas moralon, se nur oni povas trovi ĝin.” Dum ŝi parolis, la Dukino premis sin pli forte kontraŭ Alicio.

Alicio ne tre ŝatis tiun ĉi troproksimiĝon; unue, ĉar la Dukino estas (de proksime) tre malbela; kaj due, ĉar ŝi havas ĝuste la taŭgan altecon por apogi sian akran mentonon sur la ŝultro de Alicio. Tamen, ĉar ŝi ne volis esti malagrabra, ŝi laŭeble toleris ĉion.

“La kroketludo ŝajnas nun progresi pli bone” diris ŝi.

“Mi konsentas” diris la Dukino “kaj de tio la moralo estas: ‘Ho, nur la amo, nur la amo igas la mondon rondiri.’”